

itala fervojisto

1974 n-ro 03

N-ro 7-8-9-10 Julio-Aùgusto-Septembro kaj Oktobro 1974-a 24-Jaro

27-a KONGRESO DE I.F.E.F.

VILLACH - AŬSTRIO

10-a ĝis la 16-a de majo 1975 en la kadro de FISAIC (Fédération Internationales de Sociétés Artistiques et Intellectuelles de Cheminots) kaj sub honorŝirmo de aùstria federacia ministro por trafiko S-ro Erwin L A N C.

Kongresejo: KONGRESSHAUS - VILLACH (A-9500).

Konstanta adreso: 27-a IFEF-KONGRESO, Schliessfach 117, A-1103 WIEN.

Bankkonto: SPARDA VILLACH, Bahnhofplatz 4, A-9500 VILLACH, Konto n-ro 090-060, 27-a Esperanto Kongreso de I.F.E.F.

Kongresa kotizo: ĝis 31.1.75: Kongresano aù.ŝ. 260, Familianoj, junuloj ĝis 20-jar. aù.ŝ. 130. Post 1.2 ĝis 14.4.75: respektive aù.ŝ. 320 kaj 160. Simpatiantoj (ricevos la kongresajojn) aù.ŝ. 60.

IOKA KONGRESA KOMITATO (L.K.K.):

Prezidanto: inĝ. Walter HUBER - Wien, Vic-prezidanto: inĝ. Egon PAWLIK - Villach, Sekretario: inĝ. Wilhelm HERMANN - Wien, Kasisto: Rudolf ZANKO - Wien, Pluaj LKK-anoj: Hans BÜRGER - Linz, Greta GÖSSL - Linz, Johann GEROLDINGER - Linz, Ernst QUITENSKY - Wien, Josef SCHALLAUN - Wien, Franz SCHARF - Wien, Martin STUPPNIG - Arnoldstein; fakprelego: dipl.inĝ. Friedrich TSCHOM - Linz; kaj kunlaborantoj.

PROVIZORA PROGRAMO:

vendredo 9/5: gazetara kunveno, malfermo de ekspozicio, estrarkunveno.

sabato 10/5: akcepto de kongresanoj, interkona vesp.

dimanĉo 11/5: diservo, solena malfermo, fotado, duontaga ekskurso al "Dobratsch", folklora vespero.

lundo 12/5: estrar-komitat-kunsido (ne publika), internacia balo.

mardo 13/5: komisionaj kunsidoj, fakprelego, arta vespero.
merkredo 14/5: estrar-komitat-kunsido (publika), duontaga ekskurso al "Trilanda Angulo", vespere senprogramo.
ĵaùdo 15/5: plenkunsido, sinjorinaj- junulara programo, junulara vespero.
vendredo 16/5: tuttaga ekskurso al Velden (Wörther-lago), Minimundos-Klagenfurt, fermo de la kong.
sabato 17/5: komuna forveturo al la postkongreso en Salzburg.

Ŝanĝoj en la programo rezervitaj! Ne prokrastu-tuj aliĝu!

L.K.K.

I.F.E.F. - POSTKONGRESO EN SALZBURG - AŪSTRIO

17-a ĝis 19-a de majo 1975

Konstanta adreso: s-ro Anton HUBER, Minnesheimstrasse 17, A-5023 Salzburg/Gnigl, Aùstrio.

Bankkonto: Salzburger Sparkasse, Alter Markt 3, A-5010 Salzburg. Konto n-ro 311.783-5, Österr. Eisenbahner Esperantisten Verband - Salzburg.

Kongreskotizo: aù.ŝ. 150,- la paginto de la kotizo rajtas partopreni ĉiujn aranĝojn laù la programo sen plua pago.

Provizora Programo: rigardado de la naskiĝurbo de Mozart, vizito de koncerto, ekskurso kaj amuza vespero.

S K I S E M A J N O J

La Linz-a Esperanto Skisemajno (LES) 1975 okazos lastfoje en la ĝisnuna maniero sur Sportalm Strussing, Werfenweng apud Bischofshofen, de 8-a ĝis 15-a de februaro 1975. Informoj: Johann Geroldinger, Strassham 293, A-4072 Alkoven, Aùstrio.

16-a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-SKISEMAJNO

"I.F.E.S. - 75": 15 - 22 februaro 1975 en "CASA ALPINA del DOPOLAVORO FERROVIARIO DI BOLOGNA" - PLAN VAL GARDENA (Bolzano) Italio.

Poŝtkonto: 24/094 - Itala Fervojista Esperanto-Asocio "I.F.E.A." Via Donato Creti, 61 I-40128 Bologna-Italio.

Plan Val Gardena situas je la piedoj de la Dolomitoj je alteco de 1600 metroj. Plan estas parto de la urbeto Selva Val Gardena. La domo disponigas ĉambrojn je 2, 3, 4 litoj kun duŝo; nur malmultajn unulitajn sen duŝo.

Prezo por la tuta restado (kompleta pensiono) italaj liroj 40'000,-.

ĜENERALAJ INFORMOJ:

1) Samtempe kun la aliĝilo sendu nepre italajn lirojn 10'000 po persono kaj po semajno: ĉi tiu sumo ne estas repagebla kaze de nepartopreno. Ni pritraktos nur la aliĝilojn kun tiu ĉi antaŭpago.
2) "Casa Alpina del D.L.F. di Bologna" en Plan Val Gardena, kie okazos la I.F.F.S.-75 estas atingebla per aŭtomobilo. Fervoje oni devas halti en CHIUSA (km. 28 de Plan) aŭ en Bolzano (km. 45) por ekuzi la aŭtobuson kiu veturas al Plan.
3) Aliĝiloj estos akceptataj ĝis la 1-a de decembro 1974-a. Sed ni garantias la rezervigon de la ĉambroj al tiuj kiuj aliĝas pli frue.

Informoj: I.F.F.A., Via Donato Creti, 61 = I-40128 BOLOGNA (Italio).

K O K F E S T O

La 10-an de novembro 1974-a, okaze de la 13-a datreveno de la esperantista festo de la rostita koko, la fama Gastronomia Katedro de Kokurbo (Santarcangelo di Romagna) disdonos la premiojn pri la 5-a konkurso por la plej bela traduko en nacian lingvon de originala poezia teksto en Esperanto kaj pri la speciala konkurso por la plej bela desegnaĵo pri la slogano:"Esperanto, juna maniero por paroli kun la mondo".

La provizora programo estas la jena:

10,30 h. Renkonto ĉe la papa arkaĵo de Santarcangelo
11-a h. Meso en Esperanto
12-a h. Oficiala akcepto ĉe la urbodomo
13-a h. Komuna tagmanĝo ĉe restoracio Lazaroun. Dum la tagmanĝo legado de la plej belaj tekstoj. Sekvos premiado kaj loterio.

EVOLUADO DE RENFE DUM LA LASTAJ JARDEKO. Resumo de fakprelego prezentita dum la 26-a IFEF-Kongreso en Tarragona (Hispanio).

==========

1 Fervojlinioj

Kiam postmilite en 1941 estis kreita la Fervoja Nacia Hispana Reto (RENFE) ĝiaj linioj ampleksis 12778 km. kun larĝa ŝpuro de 1674 mm. En la jaro 1963 stariĝis la Dekjara Projekto por Modernigo (DPM) 1963-1972, kiu i.a. ĉesigis pli ol mil kilometrojn da neprofitdonaj relvojoj. La nun ekspluatata reto ampleksas 13523 km.

2 Renovigo kaj modernigado

La moderniga plano DPM precipe celis la ĉefajn liniojn por plialtigi tie la komercan rapidecon kaj redukti la kostojn por trakkonservado kaj veturilriparo. Oni modernigis pli ol 5mil kilometrojn da trakoj, kio forprenis 30 % el la financaj rimedoj por la plano. Por atingi, ke la meza aĝo de trako ne superu 20 jarojn, oni devos ĝis 1987 renovigi ĉiujare 500 km.

3 La cirkulanta materialo

25 % el la financaj rimedoj por DPM estis destinitaj por pligrandigi la nombron de disponigeblaj sidlokoj en komfortaj pasaĝervagonoj, kaj larĝa gamo da specialaj varvagonoj estis akirita. Elektrotrajnoj kaj dizelaj motortrajnoj kompletigas la oferton de la konvenciaj trajnoj. La tria klaso de pasaĝervagonoj estas ĉesigita, ĉirkaŭ mil lignaj vagonoj eksigitaj kaj anstataŭigitaj. La maksimume permesebla aĝo estonte estu por pasaĝervagonoj 35 jaroj, por elektrotrajnoj 30 jaroj kaj por dizelaj motortrajnoj 25 jaroj.

4 Pasaĝeroj

Proporcie kun la pliboniĝo de la nacia ekonomia stato ankaŭ kreskis dum la jardeko la nombro de transportitaj pasaĝeroj je 15 milionoj kaj tri miliardoj da pasaĝerkilometroj. La enspezoj el la pasaĝer-trafiko kreskis je 5 miliardoj da pesetoj, ĝi duobliĝis.

5 Varoj

La vartrafiko antaùe stagnanta pliiĝis en la jardeko je 5 milionoj da netaj tunoj kaj 1,8 miliardoj da tunkilometroj. Fĉ pli kreskis la enspezoj je 2,75 miliardoj da pesetoj sekve de tarifplialtigoj.

6 Specialaj transportoj

La unua kontenera trajno (TECO) trafikis 1972 inter Madrido kaj Barcelona, en 1973 oni jam transportis pli ol 30mil kontenerojn kun neta pezo de 300mil tunoj kaj 200 milionojn da tunkilometroj.

7 Trakcia materialo

La perkarba vaportrakcio grandskale malaperis dum la jardeko. RENFE akiris 90 elektrajn lokomotivojn, 112 elektrotrajnojn, 270 dizelajn linio-lokomotivojn, 215 dizelajn manovro-lokomotivojn, 19 TALGO-trajnojn, 33 TER-trajnojn kaj 125 relaùtobusojn.

8 Fiksaj instalaĵoj

Elstaris dum la jardeko la inaùguro de la nova stacio Chamartin ĉe Madrido, la konstruado de pluraj statioj laùlonge de la nova relvojo Burgos-Madrido, kaj la renovigo de multaj centraj statioj. Pri statioj por vartrajnoj estis menciinda la inaùguro de manovrejo Vicalvaro. Sur la sektoro signaliloj kaj telekomunikado oni faris preparojn por centrigita trafikkontrolo, instalante komunikilojn por alta frekvenco kaj centrigita selektilo, precipe je la linioj Tarragona-Tortosa kaj Valencia-Sagunto. Koncerne neprofitdonajn liniojn oni celas fermi kaj malinstali grandan nombron da linioj kun negativa bilanco.

Domkonstruaĵoj: Krom stacidomoj, konstruaĵoj por trakkonservado kaj kun socia karaktero estas rimarkinda la inaùguro de nova oficejdomo kaj la akiro de alia oficejdomo, ambaù en Madrido. Ankaù centra riparejo estis konstruita.

9 Elektroniko

La enkonduko de elektronika biletvendado en 1968, komence nur por trajnoj ek de Madrido, servas al rapidmoveco kaj modernigo de la vendosistemo: La biletojn inkluzive rezervado de sidloko oni jam du monatojn antaùe povas

akiri. Intertempe la servo etendiĝis al preskaù ĉiuj trajnoj kaj ĝi funkcias same ĉe RENFE-oficejoj kaj vojaĝ-agentejoj. Du pliaj komputeroj ebligis inkluzivigi i.a. la kombinon de litvagona bileto kun la vojaĝbileto en unu bileton, kaj la kontrolon de la pasaĝervagona stoko. La enkonduko de plej moderna sekurecsistemo "centra trafikkontrolo" (CTC) estas en preparo respektive jam parte okazis sur kelkaj linioj.

10 Organizado pri kontoj kaj administracio
Sekvante la kreskantajn bezonojn oni kreis por asignitaj taskoj novajn departementojn, kunfandis aliajn kaj formulis strategian planon pri la organizado.

11 La projekto RENFE 1972-1975
Ne temas pri simpla daùrigo de la DPM, tio estas nur parto. Precipe ĝi antaùvidas projekti estontecan fervojon je plej altaj rapidecoj kaj la aplikon de cibernetiko al transportproblemoj en grandaj urboj kaj por specialaj vartransportoj.

12 La homo en RENFE
Laù la strategia plano RENFE faros diversajn agadojn por disponigi familian helpon kontraù riskoj kaj malagrablaĵoj ne inkluditaj aù ne sufiĉe konsideritaj de la socia asekuro. Krome oni esploras la enkondukon de kombinita sistemo pri bazaj salajroj kaj stimulpagoj laù la evoluado de la vivkostoj. Fine oni cedos kreditojn al fervojistoj por akiri loĝejojn kaj samtempe RENFE mem konstruas familiajn loĝejojn.

13 Profesia klerigado
Oni konsideras ĉiujn kategoriojn de fervojretaj laborantoj kaj ankaù novajn aù konvertendajn fervojistojn, planas la necesajn instalaĵojn. Plie oni favoros kulturan klerigon de la laboristoj kaj iliaj familianoj per esceptaj helpoj.

14 La financa situacio
RENFE en 1970 unuafoje atingis pozitivan ekspluatbilancon kaj oni esperas en proksima estonteco atingi memfinancadon. RENFE prenis trifoje krediton ĉe la internacia Banko pri Rekonstruado kaj Progresigo (BIRF) pri entute pli ol 200 milionoj da us.dolaroj, la Ŝtato donis la necesan garantion.

JARKUNVENO DE I.F.E.A. EN LA KADRO DE LA 45-a ITALA KONGRESO DE ESPERANTO = V E R O N A.

La Jara kunveno de IFEA, en la kadro de la 45-a Itala Kongreso de Esperanto, okazis en Verona, lunde la 16-an de septembro 1974-a, en la salono de la Universitato. Ĉeestis trideko da gekolegoj inter kiuj sep eksterlandanoj: Prezidis Spartaco F.Tarlindano el Venezia. Ŝatata gasto la sekretariino de IFEF, s-ino Elfriede Kruse el Frankfurto. Ŝi kiu jam dimanĉe salutis la Italan Kongreson en la nomo de la Tutmondaj Fervojistoj Esperantistoj grupiĝintaj en IFEF, unu el la plej fortaj fak-organizoj de la tuta Esperanto-movado, salutis nian kunvenon je la nomo de IFEF mem kaj de G.E.F.A.. Ŝi gratulis pri la agado de la Italaj fervojistoj kaj donis sugestojn, pri la estonta agado, laŭ siaj personaj spertoj. F-ino Greta Gössl el Linz salutis en la nomo de Aŭstria Federacio Esperantista Fervojista, kaj invitis al la venonta 27-a Kongreso de IFEF en Villach kaj al ĝia postkongreso en Salzburg. S-ano Giovenal el Lyon salutis je la nomo de la Francaj gekolegoj kaj invitis al Ĝenerala Jarkunveno de F.F.E.A. en Kastelo Grésillon.

La sekretario de IFEA, s-ano Gimelli, dankis pro la salutoj kaj bondeziroj, kaj raportis pri la agado de la Asocio de post la Kongreso de Trento, tuŝante la jenajn punktojn:

- Gravaj atingaĵoj de nia 26-a IFEF-Kongreso en Tarragona.
- Samaj brilaj rezultoj de la 47-a S.A.T.-Kongreso en Bergamo, kie ni estis invititaj.
- Cirkuleroj de la Ĝenerala Direkcio de FS (Centra Oficejo de DLF) kiuj favoras al Esperanto. La unua dum oktobro 1970-a tuj post la 22-a IFEF-Kongreso en Rimini kaj la dua antaŭ nelonge (la 11-an de julio 1974-a). Tiuj cirkuleroj **instigas** la Prezidantojn de la lokaj DLF kaj la Departementajn Delegitojn pri Kulturo, kontribui al la disvastigo de Esperanto- kursoj kaj kluboj.
- Venonta 27-a IFEF-Kongreso en Villach kaj postkongreso en Salzburg (10-16 kaj 17-19 de majo 1975).

- Programo kaj informoj pri la 16-a I.F.E.S. (Internacia Fervojista Esperanto-Skisemajno) en Plan Val Gardena (Bolzano). 15 - 22 de februaro 1975.
- Klarigoj kaj aprobo de la finkalkulo de nia Asocio.
- Ricevo de kroma libertempo por partopreni al niaj kongresoj. S-ano Corso klarigis ke li kaj D-ro Marchiori ricevis tiujn kromajn feriojn ankaŭ kiel LKK-anoj de la 45-a Nacia F-Kongreso en Verona.
- Prezento al la Ĝenerala Direkcio de FS, fare de la Ministro, de niaj postuloj en sep punktoj, al kiuj oni respondis nee, pro manko de mono je dispono.

S-ro Tarlindano donis informojn pri la tuj venonta 6-a Trilanda Renkontiĝo de Esperantistoj de Aŭstrio, Italio kaj Jugoslavio de li organizita en Venezia kaj invitis ĉiujn partopreni.

Oni profitis la okazon por festi nian kolegon kaj estraranon de IFEA s-ron Gino Corso el Verona pro lia pli ol dudekkvin-jara agado en la Fervojista Esperanto-Movado kaj kiel kunfondinto de IFEA kaj IFEF. Jam dum la solena inaŭguro de la Itala Kongreso de Esperanto Ministro Luigi Bertoldi, donis al s-ano Corso, pokalon pro lia Esperanta agado. Ankaŭ IFEF, fare de s-ino Kruse, agnoskis la laboron de Corso per donaco de disko kun la elektitaj eroj de nia forpasinta amiko Nikolaj Rytjkov.

S-ino Kruse reliefigis la gravan laboron faritan de la Germanaj Fervojistoj-Esperantistoj, dum la Universala Kongreso en Hamburg.

Posttagmeze grupo da diverslandaj fervojistoj renkontiĝis per amika vespero ĉe la hejmo de Gino Corso.

POSTKONGRESO EN NORDA ITALIO

Post la 47-a Kongreso de S.A.T. "Sennacieca Asocio Tutmonda" okazinta en Bergamo (Italio) de la 3-a ĝis la 9-a de aŭgusto 1974-a, komenciĝis postkongreso en Padova. Preskaŭ 150 gesamideanoj gvidataj de S-ano Federico Gialanzé kaj de lia filo Ser-

gio, vizitis plurajn belaĵojn de la regionoj Veneto, Emilia-Romagna kaj Trentino-Alto Adige.

En Padova la gekongresanoj, akceptataj de s-anoj Saggiori kaj Tammone, estis gastigataj en du katolikaj kolegioj, nome "Istituto Missionari Verbiti" kaj "Istituto Don Bosco" kie ili restis de la 10-a ĝis la 16-a de aŭgusto.

Ili vizitis Verona-n kaj ĝiajn mirindajn monumentojn (gvidataj de s-anoj D-roj Marchiori kaj Bonomi); Ravenna-n kaj ĝiajn mirindajn mozaikojn (gvidataj de s-ano Bagnoli kun akcepto en la Urbodomo); Cortina d'Ampezzo-n kaj aliajn turismajn lokojn de la montaro "Dolomiti"; Venezia-n kaj ĝiajn monumentojn kaj ĝian lagunon (gvidataj de s-ano Tarlindano) kun akcepto ĉe Hotelo "Riviera" fare de s-ino Paola Volo Torta vidvino de samideano inĝ. Pietro Torta; ili atingis denove Venezia-n laŭlonge la rivero "Brento" per ŝipeto "Burchiello" post vizito al famaj vilaoj "Pisani" kaj "Foscari" (gvidataj de s-ano Saggiori); Arquà Petrarca-n kaj montetojn "Colli Euganei"-n.

Plej elstara punkto de la postkongreso okazis ĵaŭde vespere, la 15-an de aŭgusto, en la Preĝejo "San Giovanni Bosco" en Padova, kie, prezentita de la Paroĥestro mem, orgenisto Majstro Floriano Balestra, fermis la belan postkongreson per orgena koncerto mirinde ludante orgen-muzikojn de Gabrieli, Scarlatti, Bach kaj aliaj. Tondraj aplaŭdoj interrompis plurfoje la ludadon kaj fine ĉiuj longe aplaŭdis la majstron kiu dankis esperantlingve kaj adiaŭis ludante per orgeno la himnon "La Espero": La ĉeestantaro, kantis, kortuŝita.

FERVOJAJ NOVAĴOJ

- Sur la fervoja linio "Direttissima" (nova rekta vojo) Roma-Firenze, estas finkonstruita la fervoja beton-viadukto pli longa en Eŭropo, sur la rivereto Paglia.
- Okaze de la starigo de la nunjara somera fervoja horaro, la italaj trajnoj ricevis novan nomigon: T.E.E. (Trans Europ-Express) en internacia kaj enlanda servo, rapidaj, ekspresaj, lokaj trajnoj. Malaperas, do, la malnova tradicia nomigo: "Diretti", "Direttissimi" kaj "Accelerati".

- Estis subskribita la akordo inter Francio kaj Anglio por la kunligo inter la du Landoj pere de tunelo sub la "Manika markolo". La laboroj pri la elfosajo ĉe la du "terminaloj" (start-stacioj) Folkestone en Anglio kaj Calais en Francio, jam komenciĝis. La trajnoj kiuj veturigos pasaĝerojn, aŭtomobilojn kaj varojn, vojaĝos je rapideco de preskaŭ po 200 k-oj hore.

NOVA ITALA LOKOMOTIVO

Kun 10 vagonoj je rapideco de po 200 km. hore.

La Italaj Ŝtataj Fervojoj estas studantaj kaj pretigantaj la projekton de nova elektro-lokomotivo de granda povo (6000 kW.) ekipita per du boĝioj kun po tri motor-aksoj. Tiu ĉi lokomotivo estos utiligata sur la "Direttissima" (nova rekta vojo) Roma-Firenze, kiu, en la unua parto, estos aktivigata dum la jaro 1975-a. La lokomotivo tute novmanier-konstruata kaj distingita per la siglo E.666, povos treni pli ol dek vagonojn je rapideco ĝis po 200 kilometroj hore.

Por ĝia efektivigo estis pretigita modelo kiu kopias la ĉefajn karakterizaĵojn de la nova veturilo, kaj ties provoj donis bonajn rezultojn.

KULTURAJ KAJEROJ

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

La esperanta revuo "Kulturaj Kajeroj" regule eldonata, de post kvazaŭ 20 jaroj, de la fama Esperantista Kulturdomo en Kastelo Grésillon - Baugé (Francio) havas peranton por Italio: S-ro Gaudenzio Pisoni, Via Benedetto Alfieri, 24 = I-28100 NOVARA (Italio). C.C.Postale 23/16532. Abonprezo italaj liroj 1800.

Longdaŭra tradicio pri bona lingvo, interesaj artikoloj, variaj temoj (literaturaj, popularsciencaj, turismaj, movadaj, gramatikaj, distraj), elstaraj kunlaborantoj kaj informado pri la unika, en Esperantujo, vigla agado de la Gresijona Kulturdomo, povas esti allogaj kaj utilaj kialoj por ke vi mem, aŭ via E-Grupo, aŭ viaj Esperanto-gelernantoj abonu aŭ reabonu "Kulturajn Kajerojn".

6-a TRILANDA RENKONTIĜO DE ESPERANTISTOJ EL AŬSTRIO - JUGOSLAVIO - ITALIO EN VENEZIA

La 20an- 21an- 22an de septembro 1974 okazis en la sidejo de Esperanto-Grupo "La Gondolo" - ĉe la Kultura Sekcio de "Dopolavoro Ferroviario" - Venezia la 6-a Trilanda Renkontiĝo inter esperantistoj de Aŭstrio, Jugoslavio, Italio: ĉeestis 128 gesamideanoj. Organizis la renkontons-ano Spartaco Fulvio Tarlindano - estro de la Grupo kaj Delegito de U.E.A. - Direktis la laborojn la tri komitatanoj Martin Stuppnig el Arnoldstein, Tone Logar el Ljubljana, Mario Furlan (anstataŭanto de s-ano Bisi) el Trieste kune kun D-ro Zlatnar, Prezidanto de S.E.L. (Slovena Esp.Ligo), D-ro Dazzini, Vic-prezidanto de I.E.F. (Itala Esp.Federacio), inĝ. Huber, Prezidanto de A.F.E.F. (Aŭstria Fervojista Esp.Federacio), D-ro Boschin, Prof-ino Catina Dazzini kaj aliaj.

En la konsilia salono de la Komerca Ĉambro, antaŭ multnombraj geaŭskultantoj, oni pritraktis gravan argumenton: "La internacia lingvo esperanto en komerco-en turismo-en lernejo"; prelegis, respektive, d-ro Boschin-d-ro Zlatnar kaj d-ro Dazzini. Rememorante la internacian konferencon okazintan en Venezia - la 29an de aprilo 1923 - plene disvolvigita esperantlingve, la elstara konsilio substrekis la neceson starigi en Venezia provizoran komitaton kies tasko estas interrilati kun la diversaj publikaj-politikaj-ekonomiaj instancoj por enkonduki la uzon de esperanto en la komercon: per ĝenerala konsento oni elektis kiel prezidanto de tiu provizora komitato d-ron Boschin.

Post la gravaj diskutoj, oni decidis ŝanĝi la nomon "Trilanda Renkontiĝo" en "Trilanda Konferenco" por interesigi la publikajn aŭtoritatojn pri la graveco de la internacia lingvo en komerco, en turismo, en lernejo.

Multe amuzigis la partoprenintojn perŝipa ekskurso tra la laguno kun interesa vizito al du ĉefaj kaj famaj insuloj Murano kaj Burano, kie ĉiuj povis aĉeti vitraĵojn kaj brodaĵojn.

La Renkontiĝo finiĝis per Trilanda fest-bankedo ĉe hotelo "Riviera" en mondkonata "Lido di Venezia".

ĜENERALA JARKUNVENO DE F.F.E.A. EN KASTELO GRÉSILLON

La 28an - 29-an de septembro 1974 okazis en Kastelo Grésillon ĉe Baugé, la jarkunveno de F.F.E.A.(Franca Fervojista Esperanto-Asocio).

La gaja etoso kiu regas en ĉiuj esperantaj renkontiĝoj, ĉifoje kaptis ankaŭ la reprezentantojn de I.F.F.A. (Itala Fer.Esp.Asocio) kiuj (5 el Bologna kaj 4 el Venezia) entuziasme veturis al Francio por mallonga restado inter la ĝentilaj najbaraj gesamideanoj.

Dum la oficiala parolado s-ano Robiolle (Prezidanto de FFEA) per belaj vortoj tre dankis la partoprenon de eksterlandaj gekolegoj, ĉefe la italojn kiuj multnombre honorigis per ilia ĉeesto la eventon: reciproke ili estas tre dankemaj al la francaj geamikoj pro la gastema akcepto, komforta loĝado, distra ekskurso.....riĉa bunda bankedo.

Ĝis la revido!

Spartaco F. TARLINDANO

N I L E G I S

Sur la semajna gazeto "Corriere Veneto" de Padova, kvarkolonan artikolon pri la 6-a Trilanda Renkontiĝo en Venezia titolita: "Sesto incontro degli esperantisti di tre paesi: Austria, Jugoslavia e Italia"; krom pri la trilanda renkontiĝo, la artikolo parolas mallonge pri la sukcesoj de la 45-a Itala Kongreso de Esperanto en Verona, inter alie pri la intereso de la estro de la Universitato por enŝovi Esperanton kiel lernobiekto ĉe la fakultato de Ekonomio kaj Komerco de Verona.

A D E S I O N I

Per partecipare alle prossime manifestazioni internazionali dei ferrovieri esperantisti, e cioé: 16-a I.F.E.S. a Plan Val Gardena (15-22 febbraio 1975); 27° Congresso IFEF a Villach (Austria) ed al relativo postcongresso a Salisburgo (10-16 e 17-19 maggio 1975); chiedete i necessari "aliĝiloj" alla nostra segreteria: Via Donato Creti, 61 I-40128 BOLOGNA. Telefono Urbano 359071- FS.921/2178.

PARTECIPATE! FATE PARTECIPARE I COLLEGHI!